

Rencontre à l'occasion du dixième anniversaire de notre Société

Eh oui! Déjà dix ans que la S.Q.E. a été fondée, à Saint-Michel-des-Saints. Pour fêter cet évènement, nous vous invitons à une fin de semaine, du 23 au 25 octobre, à Montréal, mais à trois endroits différents. Les non-Montréalais pourront, s'ils le désirent, passer la nuit chez des espérantistes montréalais. Contactez-nous.

La première soirée commencera vendredi à 19h30, au centre espérantiste de Montréal, au 6358-A, rue de Bordeaux. Il s'agit d'une soirée de rencontre informelle.

Nous nous réunirons le lendemain matin à la bibliothèque du Mile-End, au 5253, av. du Parc, à 10h30. C'est à cette occasion que nous fêterons le dixième anniversaire de la S.Q.E. Sans oublier les 35 ans du Club d'espéranto de Montréal, ni un retour sur les congrès de cet été. Vers midi, nous irons manger dans un restaurant du quartier.

De retour à la bibliothèque vers 14h, pour l'inauguration d'une exposition d'art croate. Zdravka Metz nous expliquera sans doute bien des choses.

Le souper sera communautaire (chacun apporte un mets), au centre espérantiste de Montréal. Suivra une soirée culturo-amusante, à laquelle chacun et chacune est invité-e à contribuer.

Le lendemain, vers midi, rendez-

vous tout près du métro Berri-UQAM, au Club social des fonctionnaires municipaux de Montréal, situé au 429, rue de la Gauchetière est, qui nous sera réservé et dont le stationnement sera gratuit, et où devait avoir lieu le souper-bénéfice de juillet dernier. À sa place, il y aura un dîner. Il s'agira d'un brunch végétarien, et l'on pourra demander aux organisateurs pourquoi végétarien. Un bar payant sera ouvert.

Qui est invité? Les membres de la S.Q.E., leurs conjoint, parents et ami-e-s, tout le monde quoi! Et ceux et celles que l'on n'a pas vus depuis longtemps...

Quel est le prix: 12\$ par personne, 20\$ pour deux, 6\$ pour les enfants de 5 à 12 ans, si vous payez avant le 16 octobre. Les retardataires devront payer 15\$, 25\$ pour un couple, ou 7,50\$ pour un enfant. Il est important de s'inscrire d'avance, si vous comptez participer au dîner de dimanche. Faites-le au (514) 272-0151.★

Dekjariĝa renkontiĝo

Jam antaŭ dek jaroj estis fondita Nia Societo, en Sankta-Mikaelo-de-l'-Sanktuloj. Por prifesti tion, ni invitas vin al semjanfina renkontiĝo, de la 23a ĝis la 25a de oktobro, en Montrealo, sed nu en tri malsamaj lokoj. Ekstermontrealanoj povos tranokti ĉe montrealaj esperantistoj. Sciigu nin.

La unuan vesperon ni pasigos en la Montreala Esperanto-Domo (M.E.D.), je 6358-A, rue de Bordeaux. Temos pri neformala

interkona vespero.

Postan matenon, ni rerenkontiĝos en libropruntejo Mile-End, je 5253, av. du Parc, je 10h30. Tie ni ja vere prifestos la dekjariĝon de E.S.K. Kaj ankaŭ la 35-jariĝon de M.E.K., kaj ankaŭ parolos pri la ĵusaj someraj kongresoj. Tagmeze, ni kune iros tagmanĝi en apuda restoracio.

Ree en la librejo ĉ. 14h, ni povos ĉeestis malfermon de kroata artekspozicio. Zdravka verŝajne multon rakontos al ni.

La sabata vespermanĝo, ree en M.E.D., estos komuna: ĉiu kunportu pladon. Sekvos kulturamuzo vespero: ĉiu bonvenu kontribui.


La dimanĉon, tagemeze rendevu apud stacio Berri-UQAM, en Club social des fonctionnaires municipaux de Montréal, situanta ĉe 429, rue de la Gauchetière est, kie devis okazi la julio profitcela vespermanĝo. La parkejo estos senpaga. Ni partoprenos en vegetara bufedo, kaj eblos demandi, kial vegetara. Estos drinkaj-vendado.

Kiu venu? La gemembroj de E.S.K., iliaj kunuloj, geparencoj kaj geamikoj, nu, ĉiuj! Kaj ankaŭ tiuj, kiujn oni delonge ne vidis...

Kiom kostos? 12\$ por unuopulo, 20\$ por paro, aŭ 6\$ por infanoj de

...

Un cours d'espéranto pour débutants commencera à Montréal le jeudi 1^{er} octobre, à 19h30, au 6358-A, rue de Bordeaux. Il se tiendra ensuite tous les jeudis jusqu'au 10 décembre. Le coût est de 50\$.



Que de souvenirs... plein la tête et plein le cœur

*Normand Fleury
président du comité organisateur*

Le 48^e Congrès mondial d'espéranto pour la Jeunesse est maintenant chose du passé. Montréal a vécu durant une semaine (pour dire vrai, durant plus d'un mois, puisqu'au moment d'écrire ces lignes, il y a encore des espérantistes européens qui logent dans des familles montréalaises) une belle expérience d'amitié internationale.

Les médias montréalais sont bombardés de tous bords par des communiqués annonçant des congrès mondiaux avec des milliers de délégués. Un de plus, un de moins, «al kiu gravas?», Montréal vit en par-

tie grâce aux retombées économiques découlant de la venue de ces congrès. Ce qui rend notre congrès différent, ce n'est pas le nombre de participants (environ 100) ou les belles résolutions qui tombent la plupart du temps dans l'oubli... mais le fait que nous sommes le seul congrès international (regroupant plus de vingt pays) où pas un seul sou n'a été dépensé en service de traduction. Tous les participants ont pleinement pris part aux activités du matin au soir.

J'ai vu et surtout entendu des Bulgares converser avec des Américains des changements dans

les pays de l'Est, des Allemands chanter avec des Néerlandais et des Québécois, des Japonais discuter avec des Russes... librement, simplement, amicalement en espéranto.

Je suis heureux parce que le mouvement espérantiste québécois a réussi le défi qu'il s'était lancé, organiser avec succès hors d'Europe, un congrès mondial où l'espéranto enivrerait tous les participants.

Merci aux participants, aux bénévoles, aux membres du comité organisateur. À la prochaine en juillet 1992 à Vratsa, en Bulgarie.★

Commentaires de congressistes

Un gros merci pour un congrès charmant, joyeux, organisé avec cœur et attention. Saskia Idzerda, présidente de TEJO, Pays-Bas.

J'ai bien aimé le thème, car ils sont souvent si sérieux. Je participe rarement aux conférences et ateliers, mais je l'ai fait cette fois-ci. Heléne Brännmo, Suède.

Amusant et bien organisé. Tous les organisateurs étaient gentils et serviables. Mon premier congrès est vraiment inoubliable. Laurinda MacGillivray, Nouvelle-Écosse.

Des cinq rencontres internationales auxquelles j'ai participé, celle-ci était certainement la plus amicale. Olivier Moreau, France.

•••

E.S.K., iliaj kunuloj, geparencoj kaj geamikoj, nu, ĉiuj! Kaj ankaŭ tiuj, kiujn oni delonge ne vidis...

Kiom kostos? 12\$ por unuopulo, 20\$ por paro, aŭ 6\$ por infanoj de 5 ĝis 12 jaroj, se vi pagos ĝis la 16a de oktobro. Poste, kostos 15\$, 25\$ por paro aŭ 7,50\$ por infano.

La Riverego

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia.

Aperas trimonate. Eldonkvanto: 200

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux:

Bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktis: Sylvain Auclair. Grafike aranĝis: Graphicom inc.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Normand Fleury, Andreas Kleeman,

Zdravka Metz, Sylvain Quirion kaj Yanic Viau.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 10 \$.

UEA-kodo: kebk-d.

Limdato por la venonta numero: 1^a de decembro de 1992.

Esperanto-Societo Kebekia

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal, Québec

H2G 2R8

telefonrespondilo: (514) 272-0151

48a I.J.K. Plena sukceso

de Andreas Kleeman, Germanio

Un participant relate ici les principaux événements ayant marqué le congrès jeunesse de Montréal. Un petit congrès, ce qui rendait possible des rencontres avec tous les autres participants.

La ĉi-jara I.J.K. en Montrealo estis eksterordinara por mi. Unue pro la programo, kiun la L.K.K. ofertis al ni, due pro la internacieco de la partoprenantaro. Ni estis ĉirkaŭ 100 personoj el 5 kontinentoj kaj oni ne nur renkontiĝis kun samlandanoj sed ankaŭ kun ĉiuj aliaj kongresanoj.

La kongresa temo «Libertempado» donis al la partoprenantoj la eblecon ekscii pri ne tiom konataj kaj praktikataj sportoj kiel la bastonkorbludo kaj la esplorado de kavoj. Krome kompreneble ne mankis la muzika programero: okazis internacia koruso, gvidata de S. Idzerda kaj muzikado kun psalterionoj (20-korda instrumento). Ambaŭ laborgrupoj prezentis dum la lasta vespero, la ĝisrevida spektaklo, pecojn de kebekia muziko. Imagon pri Kebekio oni ankaŭ povis ricevi ĉeestante la interesan prelegon de Silvano pri kebekia — ne franca! — lingvo, kaj dum biciklado aŭ marŝado tra la urbo, kiu festas tre vigle sian 350-jariĝon.

Tre plaĉis al mi la «verdaj olimpigoj». La kongresanoj ĝuis la komunan ludon per granda pilko kaj paraŝuto. Ĉiuj rajtis unufoje provi iamaniere resti sur la granda pilko tiom longe kiom ili povis. Dume la spektantoj manfrapis kaj kalkulis la sekundojn.

Post tio ekestis ĉe la ludo hokeo sur herbo arda batalo inter du teamoj. Tagojn poste oni ankoraŭ sentis la muskoldoloron pro ĝi.

Profunde impresis min la restado ĉe la indiana vilaĝo. Ni povis sperti la vivon de indianoj kaj ilian pens-

manieron. Unu indiana familio montris kiamaniere konstrui kanuon kaj aldone rakontis fabelojn, kiujn ni rememoru por rakonti al aliaj. En la nokto tie, kelkaj bravaj esperantaj indianoj, inter ili ankaŭ mi, estis surprizitaj de rivereto, kiu ekiĝis pro pluvo kaj kiu fluis rekte en la tendon, kie ili dormis surplanke. Tiu evento eble estis la malfrua venĝo de la indianaj spiritoj...

La ĉiutaga kulmino estis la vespera programo, kiu estis tre zorge organizita de L.K.K.-anoj kaj multaj aliaj helpantoj. La acera festo kaj Kebekia vespero ekzemple, dum kiu ni eksciis pri la acera tradicio ĉi-tie kaj pri la popoldancoj de Kebekio. Malgraŭ komenca hezito ekestis poste amasa komuna dancado gvidata de la estro de la grupo.

La lasta vespero estis samtempe la fermo de la kongreso kaj la festo de la naskiĝdatreveno de Zdravka Metz (L.K.K.-anino) kaj Vincent Bley el Francio. Ĉiuj involviĝis en prezentadon aŭ mem prezentis ion al la atentema publiko, tiel ke ĝis frumatene daŭris la programo.

Fine mi volas danki al la L.K.K. kaj al ĝiaj helpantoj pro la tre riĉa kaj interesa I.J.K. Mi certas, ke al ĉiuj tiu kongreso multe plaĉis kaj ke neniu forgesos la agrablajn tagojn.

Vivu la verdaj sciuroj!★

Komentoj de kongresanoj

*Finiĝas kongres' Montreala
Poste semajno de ĝuo regala
Mi certigas al vi,
Ke la evento ĉi
Restos miamemore malpala
Sajmĉjo, Britio*

*Dum TEJO-kongres' Kebekia
Enuo ja estis nenia
Malgrandas rondet'
Sed grandas impet'
En tiu etos' familia
Martin Haase, Germanio*

*Je félicite les organisateurs,
surtout pour l'excursion chez les
Amérindiens, où j'ai beaucoup
appris. Yves Bachimont, France.*

*Merci pour la bonne ambiance et
les sourires. Je vous attends en
Bulgarie l'an prochain. Zdravka
Boïtchéva.*

Ce congrès a vraiment été un sommet dans ma vie espérantiste. Je n'avais jamais vécu une rencontre jeunesse aussi internationale, et je doutais en fait que ce soit possible hors d'Europe. Je sais maintenant que cela peut arriver ici, dans notre Amérique. Grant Goodall, États-Unis.

**Avez-vous
déménagé?
Si oui, n'oubliez pas de
nous informer de votre
nouvelle adresse.**

**Ĉu vi
transloĝiĝis?
Se jes, ne forgesu scii-
gi nin pri via nova
adreso.**

Un congrès mémorable!

Sylvain Quirion

Déjà dimanche soir, les premiers arrivants commencent à bâtir, dans le *Nesto*, l'atmosphère du 48^e congrès jeunesse d'espéranto. Plusieurs d'entre eux étaient passés par la *Esperantodomo*, rue de Bordeaux, et la frénésie lentement mûrie semblait aboutir à un état de joie beaucoup plus détendu que ce que j'avais anticipé. La symphonie des plaintes s'orchestre rapidement avec un premier mouvement de six étages jusqu'aux dortoirs. On y trouve les bons côtés: ça va décourager les voleurs, ça va nous mettre en forme (même Damir, qui a fait le trajet plusieurs fois pour montrer le chemin aux participants, est encore pétant d'énergie à la fin de la soirée) et en prime, on a une vue magnifique sur la ville et sur un feu d'artifice (en notre honneur?).

La journée du lundi suit son cours sans trop d'embûches. Quelques retards sans gravité viennent pimenter l'enthousiasme des participants. Cette journée se termine par une partie de sucre suivie d'une soirée folklorique. Les danseurs invités enseignent les danses aux congressistes et, en échange, le «calleur» apprend quelques mots d'espéranto, ce qui simplifie grandement la tâche du traducteur. Une soirée inoubliable dont on se reparle pendant tout le congrès et qui nous a valu une photo et un article dans *La Presse*.

Mardi, la pluie augure des conditions de l'excursion chez les Amérindiens. Une aventure typiquement américaine qu'aucun n'est près d'oublier. Le retour se fait avec

beaucoup de retard. Les changements au programme sont routiniers à partir de ce moment, mais la publication quasi quotidienne d'une petite revue d'une page, le «SCIU-ro x», permet de garder tout le monde sur la même longueur d'onde.

Les points culminants du reste de la semaine furent: un quizz aux résultats si serrés que tout le monde a gagné un prix, un spectacle du groupe *Akvo* dans lequel nos étoiles québécoises de la musique rock ont habilement collaboré avec la voix bulgare de Zdravka Boïtchéva, des excursions à bicyclette sur le Mont-Royal avec des vélos gracieusement prêtés par les espérantistes montréalais et leurs amis (merci Réjean pour ton vélo à quatre places!), une soirée de films d'animation, et une soirée d'adieu où tous ont gagné un petit prix qui saura leur rappeler avec émotion ce congrès IJK, le plus fameux que Montréal ait connu, et moi aussi!★

Ĉu baldaŭa kunlaborado KEJO-JEFO?

Yanic Viau

Dum la lasta I.J.K. ĉi-aŭguste, manifestiĝis deziro reaktiviĝi KEJO-n (Kebekian esperantistan junularan organizon). Pluraj kunsidoj okazis kaj ĉiuj junuloj interesiĝis pri estigo de nova estraro. Oni ankaŭ interkonsentis pri la unua celo de nia organizo, kiu konsistu el eldonado de bulteneto por kreskigi la membraron. (Estas aktuale nur 15 anoj en KEJO.) La laboro restu progresiĝa, tamen daŭra. Sekve, Nicolas Grégoire, Martin Séguin kaj mi mem provizore estros KEJO-n, helpe de kelkaj aliaj junuloj. Oficiala estraro estos akceptata dum venonta ĝenerala kunsido aŭ per poŝta voĉdono.

Interesa afero estas kontaktoj, kiujn ni estigis kun aktivuloj de JEFO (la franca landa sekcio de TEJO). Partoprenante la IJKon, ili post diskutoj decidis subteni nin dank'al modernaj varbrimedoj nun pretigitaj de reklamisto en Parizo. Ili ofertis al ni ankaŭ teĥnikan sub-

Attention aux chèques

Au cours des derniers mois, il est arrivé à quelques reprises que la caisse populaire de la Société lui retourne des chèques sans provisions. Nos membres doivent se rappeler que la S.Q.E. est une petite association, dont le volume d'affaires ne justifie pas une visite quotidienne à la caisse. Dans certaines périodes creuses, il peut même se passer plusieurs semaines avant qu'un chèque ne soit encaissé. S'il vous arrivait, au cours d'une telle période, que votre solde baisse trop, veuillez nous en avertir: vous diminuerez ainsi les risques de découvert.

Somera Semajnfina Renkontiĝo en Otavo

Zdravka Metz

*Commentaires critiques sur une rencontre organisée
par l'Association ontarienne d'espéranto.*

En vendredo 28a de aŭgusto komenciĝis tritaga renkontiĝo de Ontaria Esperanto-Asocio. Organizita de otava triopo, ĝi ja meritas priskribon.

Programon esperantecan (kiel helpi novulojn, esperantlingva filmo, komitatkunsido kaj neforgesebla Interkona vespero) akompanis manĝoj kaj manĝetoj. En posttagmezaj horoj estis vizitoj al Civilizar-kaj Natur-muzeoj.

Kion diri pri la etoso?

Interkona vespero komenciĝis tre amike. Ĉiu parolis kun apudulo. Ni estis pli ol dek personoj. Ĉe tablo natura manĝeto servita, parolante duope aŭ triope, ne forgesante la

tenon por ellabori eventualan bul-tenon. Ĝis konkretigo de specifaj projektoj, okazas leterkontaktoj. Intertempe, ne hezitu varbi pri KEJO ĉe viaj konatoj kaj kontaktu nin ĉe l' kutima informserva telefonnumero: (514) 272-0151.

★★★

Lors du dernier congrès de la jeunesse, à Montréal, quelques jeunes ont décidé de reprendre progressivement en main l'OJÉQ (Organisation de la jeunesse espérantiste du Québec). Des projets seront probablement réalisés grâce au support technique que nous ont offert des jeunes Français de JEFO, l'organisation homologue à l'OJÉQ chez nos cousins. C'est à suivre.★

novulojn, oni interkonatiĝadis. Venis la momento de oficiala komenciĝo: ĉiuj sidiĝis ĉirkaŭ la tablo. Granda problemo montriĝis: la organizanto forgesis la glasojn por servi la senalkoholan vinon. Volontulo iris demandi apudan grupon, ĉu eblas prunti glasojn. Sukcese, sed ne sufiĉis. Do kiu denove irus plie peti?

Etoso streĉa; respondeculo, defendante sin, klarigis, ke ne povis li zorgi pri ĉio. (Tute prave, organizante oni dividas taskojn.) Mi gustumis tiun vinon, nek dolĉetan nek vingan. Kia likvaĵo! Partoprenantoj ekrigardis unu la alian, kvazaŭ demandante: ĉu vere ni devas trinki tion, kion unu persono decidis? Kutime, oni ja donas elekton inter du trinkaĵoj, kaj sekvan fojon oni servas laŭ plaĉo de ĉeestantoj. Tiel oni instruis al mi dum mi komencis organizi tiajn vesperojn.


Ni ektrinkis po du el sama glaso, kiel parolas kroata kanto «De sama glaso ni amon trinkis...»

Sed ĉi tie ne regis amo.

Malagrabla sento kaptis min. Diskutoj pri honora gasto... li ja venis de Rusio, granda esperanta aktivulo estas li, organizanto de plurcentpartoprenataj esperanto-renkontiĝoj. Kiom ni povus aŭdi, lerni... Sed la demandoj al li estis monologe politikaj: kial ekskomunistaj landoj ne ŝatas la rusan kaj la Rusojn?

Bonŝance pasis la tempo kaj ni disiĝis.

Ege feliĉa mi estis reveninte ĉe niaj gastigantoj Beverly kaj Marko, kie regis etoso de paco, harmonio, amo. Vera esperantujo!



La kadrokurson *Kiel helpi novulojn* mi ne partoprenis, sed mi ja demandis pri la mateno tiujn, kiuj ĉeestis. Ili estis nur kvin kaj post «akva» diskutado ne eblis ion konkludi — estis la opinio de kelkaj novuloj.

Ĉiuj partoprenintoj revidis sin dum spektado de grandekranaj filmoj pri postmilitaj orfoj. Senalkoholan vinon oni servis...

Dimanĉon matene: komitat-kunsido. Estis ja por otava triopo. Verŝajne ni baldaŭ legos protokolon.

Mi emus starigi demandojn, kiujn mi ja starigadis al pluraj dum tiu semajnfino. Estas malgaje konstati pri du grupoj de esperantistoj en la sama urbo. Kie estas toleremo, respekto, solidaremo de la esperanta granda familio?

Kial ne venis OEA-anoj de aliaj urboj? Trovinte la respondon, la movado povos pli demokrate antaŭeniri kun pli da espero.

Mi ankaŭ flustrus plian veron al la organizantoj. Renkontiĝo ne estu momento, kiam oni per aliĝoj kolektas monon por agado. Ĉiu ŝatas pagi tion, kio ja necesas, kaj ne senti sin tropaganta. La esperantistoj estas donacemaj, kiam oni klarigas la bezonojn de krizaj financoj. Ankaŭ tion mi spertis.

Kaj por fini la priskribon de la renkontiĝo, mi daŭrigu. Dimanĉa tagmezo: pikniko ĉe Henĉjo pro la vetero, sed preparita de Beverly kaj Marko. Gratulon al ili du, kiuj sukcesis tre malaltkoste organizi la bongustan bufedon. Dankon al Henĉjo, kiu disponigis sian domon,

El la jara ĝenerala kunsido

Extraits des rapports présentés lors de l'assemblée générale de juin dernier, à Sainte-Catherine-de-Hatley, ces textes dressent une image de la Société québécoise d'espéranto.

La prezidanto:

Pro la okazigo de la I.J.K. en Montrealo, iel la estraro malpli dediĉis atenton al societa agado. La fakto, ke la estraranoj de E.S.K. estas ankaŭ en la Loka Kongresa Komitato iel pezigis ilin per oftaj kunsidoj kaj pliaj taskoj. En septembro, ni planas prilabori novan korespondan kurson kaj esti pli aktivaj.

Okazis provinca renkontiĝo en Kebeko, pasintan oktobron, sed bedaŭrinde malmultaj ĉeestis kaj multe... pluvis. Tamen la renkontiĝo estis agrabla kaj la junulara gastejo estis taŭga loko. Ne okazis aliaj provincaj renkontiĝoj. Daŭre la estraro alvokas al helpo ĉar ni ŝatus havi helpanton, kiu okupiĝus pri organizado de tiuj renkontiĝoj.

La Riverego aperis regule, kvarfoje kiel planite. Christian Chamberland nun okupiĝas pri la grafika flanko de ĝi, tiel ĝi multe plibeliĝis. Fakte, nun ĝi estas ne nur interesa kaj leginda sed ankaŭ alloga por prezentado al la publiko aŭ al ĵurnalistoj.

kaj al Mikaelo por la sabata filmo, dankon al Manŭelo, kiu multe laboris por trovi informojn kaj surpaperigi ilin en la formo de aliĝilo kaj programo.

Ĉi tiu artikolo estas ja kritika; bonvolu tamen kompreni ĝin kiel bonintencan, kiel pozitivan kritikon. Mi nur volis mesaĝi al la organizantoj, ke, por mi, plej gravas la etoso, ĉar dum mi libertempas, mi ŝatas senti amikecon kaj ĝojon por renkontiĝoj,

La sekretario-kasisto:

Ni havis ĉi-jare tre malbonan financon jaron, kun malprofito je pli ol kvarcent dolaroj. Malkreskis pluraj enspezoj: la ĉefaj estas la kotizoj, la donacoj kaj la subvencio de K.E.A.

Se ni krome konsideras, ke estis, je la 1a de junio, 128 membroj, t.e. ses malpli ol pasintan jaron, ni devas akcepti la fakton, ke la Societo aĉe stagnas. Ni ne sufiĉe sukcesas reteni niajn membrojn aŭ trovi novajn. Klopodante solvi tion, ni ĉi-printempe reskribis al ĉiuj niaj eks-membroj kaj al inform-petintoj, kun nenioma rezulto: el preskaŭ tricent leteroj nur unu realiĝis. Mi devas konfesi, ke mi ne scias plibonigi la situacion.

Mi esperis, malprave, pligrandigi la enspezojn per akiro de pliaj membroj. Ĉar tio ne ekestis, la Societo verŝajne devas plialtigi siajn kotizojn. Mi multe preferus la unuan metodon.

Mi esperas, ke post la I.J.K. la estraranoj kaj aliaj aktivaj membroj de E.S.K. povos dediĉi pli da energio al la replibonigo de la Societo,

kaj ne streĉon kaj aliajn malajn sentojn.

Tiel ja oni allogas malnovajn esperantistojn kaj certe pli longtempe konservos en la movado la novulojn.★

kiu prifestos sian dekjariĝon en la venonta aŭtuno: ĉu ĝusta momento por reekresko?★

Aliĝu al la Pasporta Servo de TEJO

Se vi ŝatos ricevi junajn (kaj malpli junajn) esperantistajn vojaĝantojn, kaj pretus ilin gastigi en via hejmo, nepre fariĝu gastiganto de la *Pasporta Servo de TEJO*. Ĝi estas tutmonda reto de senpagaj gastigeblecoj. Ju pli densa estos la reto, des pli efika kaj alloga ĝi estos; kaj komforto malmulte gravas. La limdato por la venontjara eldono estas la 1a de decembro. Petu informojn ĉe ESK.

Evangelino

La antaŭparolo

de Henry Wadsworth Longfellow
tradukis William George Adams

Jen la arbaro pratempa; la murmurantaj pinarboj
Staras en verdaj vestaĵoj, en la krepusko malluma,
Kiel druidoj antikvaj, voĉoj malĝojaj, profetaj,
Kiel harpisto blankharaj, longaj la barboj sur brusto.
De la kaverno profundaj, la oceano najbara
Raŭka per voĉo respondas de la arbaro ĝemadon.

Jen la arbaro pratempa. Kie nun estas la koroj
Kiuj sub ĝia branĉaro kiel cervido eksaltis,
Kiu sub arbo ekaŭdas de la ĉasanto la voĉon?
Kie vilaĝo humila, hejmo de la kamparanoj,
Homoj de kiuj la vivo kiel rivero iradis,
Kies trankvilaj fluadoj pasas tra paca arbaro,
Sub la branĉaro de l' tero, ankaŭ sub bildoj ĉielaj?

Tio ĉi estas nur parto de la antaŭparolo al
fama poemo. Ĝi troviĝas en la libro *Esperanto*
— *Learning and Using the International*
Language. (Inter NI, Nro 73, majo 1992)

Novaj kotizoj

Pro malkontentiga mona situacio, E.S.K. devas altigi
siajn kotizojn. Jen do la novaj. Por ordinara membro:
10\$ / 20\$ / 30\$, por unu, du aŭ tri jaroj; favoraj kotizoj: 7\$
/ 14\$ / 21\$; familioj: 14\$ / 28\$ / 42\$. Ekzistas frualiĝa
rabatita trijara kotizo je 27\$ por ordinara membro kaj
38\$ por familio. Jara abono al *La Riverego* nun kostas
10\$.

Hausse des cotisations

La situation financière de la S.Q.E. ne nous laissait guère
le choix. Voici les nouvelles cotisations: 10\$ / 20\$ / 30\$
pour un, deux ou trois ans; cotisations réduites: 7\$ / 14\$
/ 21\$; familles: 14\$ / 28\$ / 42\$. Cotisation pour réadhé-
sion hâtive (pour trois ans): 27\$ (38\$ pour les familles).
L'abonnement annuel à *La Riverego* coûte 10\$.

Jarkunsido de la Kanada Esperanto- Asocio

Kelkaj KEA-anoj kunsidis kadre de
la Internacia Junulara Kongreso en
Montrealo. Gvidis la diskuton Mark
Fettes kaj Normand Fleury. Oni pri-
parolis la estraran raporton, la poŝtan
kurson, reaktivigon de Junularo
Esperantista Kanada. Estis proponite
aranĝi regionajn renkontiĝojn kaj pli
rilati kun ELNA (usona asocio).

Service téléphonique en Suisse

Depuis le 2 mars, on peut recevoir
4 minutes de nouvelles quotidiennes
en espéranto au 156-5434, au coût
de 4 francs suisses (env. 3,50\$).
Soixante pour cent de cette somme
va à Amikaro Esperantista, qui fournit
le service et récolte les informations
au +41-71-592025. [*Esperanto*, juin
1992] Il est pour le moment cepen-
dant nécessaire d'appeler de Suisse
pour atteindre ce service.

Protektado de minori- tataj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la raj-
tojn de minoritataj lingvoj; la esperan-
tistoj oponu nenian specifan lingvon
— naciaj lingvoj estas respektendaj,
sendepende de grandeco. Esperan-
tistoj tamen malkontentu pri la uzo de
naciaj lingvoj por transnaciaj celoj,
precipe kiam tio diskriminacias kon-
traŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj
minacas la pluvivon de minoritataj
lingvoj kaj kulturoj. [Proklamo de
Voss, 1991, laŭ *Esperanto*, marto
1992]

Senlaboreco

Pentti Törmälä (Finnlando) ricevas,
anstataŭ senlaborulan helpon, ŝtatan
subvencion por kolekti poemojn pri
senlaboreco. Skribu al:
«Työttömyysrunot», Karhukengän
90.061 ry, Tuomarinkartano, SF-
06100 PORVOO, Finnlando.
[*Esperanto*, junio 1992]

